Augustin Wibbelt,

Somera kanto

tradukita de Manfredo Ratislavo

Sub hela sunradio
malhelas la arbar‘,
ĉirkaŭe verdas ĉio,
brilegas grenkampar‘.

Kaj ornamita estas
per floroj nun la ter‘,
la nokto eĉ sin vestas
arĝente en somer‘.

Viglega moviĝado
regadas ĉirkaŭ mi,
beatas la vivado,
someras ĉie ĉi.

Traduko de la Germana poemo “Summerleed” de Augustin Wibbelt *(∗1862-09-19 – †1947-09-14) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1983.*

MR-058-2b / Arg-516-1015 (2010-02-21 01:27:28)

Profesoro d-ro Hans Taubken, estrarano de la societo “Augustin Wibbelt”, afable permesis al mi, Manfred Retzlaff, per retletero de l’ 30.04.2008 la enretigon de miaj tradukoj de poemoj de Augustin Wibbelt. Vidu ankaŭ la retejon de la societo “Augustin Wibbelt”: `http://www.muenster.org/wibbelt/`.